

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—, fremdlando: bonvaluta Kĉ 25.— (5 sv. fr.) malbonvaluta Kĉ 15.— (3 sv. fr.) Konto de la ĉekoficejo Praha n-ro 34.271.

NEAGRABLA ARTIKOLO

Oni povus kredi, ke en la jarcento, kiu ofte estas nomata jarcento de organizo, ne plu estas necese klarigadi la signifon kaj la neceson organiziĝi. Sed la spertoj en la esperanta movado montras, ke precipe esperantistoj ne sufiĉe taksas la forton kuŝantan en forta organizo de ĉiuj.

Kaj tiel ankaŭ en nia lando, kiu enhavas notinde grandan nombron da adeptoj de esperanto, la Nacia Societo Ĉeĥa, Ĉ. A. E., devas ripetē voki kaj insisti pri aliĝo.

Kiom da esperantistoj estas en ĈSR? venas demando de grava aŭtoritato.

Ni ne scias, devas soni nia respondo, ĉar krom la 1500 p. enskribitaj en la mem-brolibro de ĈAE, dise staras en la tuta lando necerta nombro, pri kies grandeco ni havas nur ian ideon laŭ la multaj adresoj en diversaj adresaroj kaj gazetoj, laŭ la korespondado, mendado de libroj, ktp.

Delegu al ni paroladiston, ĉar en nia urbo ni helpe de la gazeta servo de la Propaganda Sekcio sukcesis vekti intereson.

Kaj, ĉar cent samideanoj ne trovis necesa doni po 1 Kĉ al propaganda kaso, iu el samideanoj, al kiuj oni ofte envas la nepetitan de ili titolon „gvidanto“, elspezas siajn aŭ de sia familio 100 Kĉ, por ke la delikata floro de l'intereso pri esp-o ne velku.

Asocio eldonu propagandilojn, tio estas ja ĝia tasko, ni ĉion ĉi bezonas, skribas „oni“.

Kaj dume Asocio ne povas daŭrigi la eldonadon, ĉar amaso da flugfolioj, propaganda broŝuro de eminenta valoro, kies eldono ebligis donaco, kuŝas, nemendata,

ĉe funkciuloj, kies edzino aŭ patrino nur malofte ĝuas la ĝojn vidi la amason — en ŝrankaj destinitaj por alia celo — degeli sekve de hazarda mendo de iu — klubo, ne — de iu oferema samideano.

Ĉion ĉi kaj multon alian oni postulas — kaj prave — de sia nacia societo, ĉar ĝi, granda kaj pli potenca ol individuoj aŭ lokaj kluboj, povas tion fari.

Jes, amikoj, granda kaj potenca Asocio povas. Sed antaŭe — ni faru ĝin tia. Aliĝu kaj realiĝu al ĝi. Ŝparu por ĝi de ie 10 Kĉ jare kaj 1 Kĉ monate.

Donante al ĝi tiujn ĉi krondekojn, vi donas al ĝi dek milojn. Vi ne kredas?

Aŭskultu do fabelon.

En iu lando 500 izolitaj fervoruloj pagis 10kronan kotizon al sia centro. Pluaj 1500 ĝin pagis al siaj kluboj, kiuj donis el ĝi al la centro po 2 Kĉ kaj el tiuj ĉi 2000 sole tri kvaronoj pagis ankoraŭ unu kronon monate. Multiplu kaj adiciu: vi konvinkigos, ke iliaj 10 plus 12 x 1 rezultigis ĉirkaŭ 25.000 da tiuj moneroj kronaj, kiuj unuope estas malforta ero, sed kunigite faras potencan aron.

Vi opinias, ke en nia lando estas pli ol du mil esperantistoj? Mi ankaŭ, sed diojn mi laŭdus, se da tiaj, pri kiuj parolas la fabelo, estus sole unu milo. R. H.

Ni sendas al vi la 3an n-ron dankante al vi pro la sendita abono. Se vi ne sendis ĝin ankoraŭ, ankaŭ dankon al vi, pro tio ke neresendinte la unuajn du n-rojn, vi montris vian intencon fariĝi abonanto. Uzu pagilon el la unua n-ro aŭ petu ĝin ĉe ni.

LITERATURO

JAN VRBA:

KRISTNASKA ARBETO

El „Libro el la naturo“, trad. K. Procházka.
(Daŭrigo)

Sed li ankoraŭ ne alvenis eĉ en duonon de la ĉambro, kiam li subite haltis kaj rapide revenis al la fenestro. Li denove sin krucbenis, ekrigardis la nubeton, kiu estis jam jam perdiĝanta en altaĵo, kaj rapide ekpetis: „Jesueto, mi petas cin, atendu! Ili loĝas ĉe fino de l'antaŭurbo kontraŭ la arbaro, kaj ŝia paĉjo havas nigran ĉapon, sur la mentono barbon, kaj ruĝan nazon — kaj sur la surtuto li portas flavan rondan ladeton — kaj sur la ŝultro rustiĝintan pafilon!“ —

Poste, kiam la panjo estis lin metanta en la liteton por dormo, li vidis, ke ŝi havas la okulojn plenajn de larmoj. Tiam venis al li la ideo, ke ŝi eble lin aŭdis, kiel li preĝis ĉe la fenestro. Li iel ekhontis, kaj por ŝin kvietigi, li diris virece kaj konvinke: „Nu, ne ploru, panjo, mi ja pro tio neniel ĉagreniĝas! Mi cetere iris tien sole pro Manjo, por ke ŝi ne ploru refoje, kiel lastjare, se Jesueto estus al ni nenion donacinta...“

Tion dirinte li kontente endormiĝis. —

Sed kia estis matene lia surpizo! Jesueto estis nunjare multe pli bona ol la pasintan jaron. Li eĉ ne tion konsideris, ke ili ne havas arbeton kaj donis al ili donacetojn laŭ maniero de sankta Nikolao en teleretojn sur la fenestro. Estis tie nuksoj kaŝtanoj, figoj, pomoj, estis tie eĉ sukeraĵoj. Ĝojo plenigis la ĉambron, kaj de ĝi tenata, Georĉjo eĉ ne rimarkis, ke la panjo malsanktigis la Kristnaskan feston kaj kudiris diligente de la mateno ĝis la vespero.

Sed la sekvantan tagon kaptis lin stranga malĝojo. La konscienco en li laŭtigis. Li konsciigis, ke al la filineto de la gardisto Jesueto donacis nenion, ĉar li plendis al li kontraŭ ŝia paĉjo — kaj ŝi nun certe ploras... Tiel konsiderante li sidis iom da tempo en anguleto, ĝis li fine malfacile decidigis. Li metis en la poŝojn de l'surtuto kelke da pecetoj de ĉio el la telereto — kaj eliris el la domo.

Li iris al la familio de la ĉasgardisto. Sur korto de ilia dometo li renkontigis

kun la gardisto de l'arbaroj. Ili ekkonis unu la alian, kaj Georĉjo demandita sincere diris, kial li venas: kiel li plendis al Jesueto, kaj kiel li nun bedaŭras la knabinecon, kiu ricevis neniun donacon kiel puno por tio, ke li — ŝia paĉjo — prenis al li la arbeton. La gardisto ekridis kaj kondukis lin en la ĉambron.

Georĉjo ne povis kredi al sia vido. En la ĉambro estis arbo — sed arbo de la planko ĝis la plafono kaj plena de sukeraĵoj kaj frandaĵoj. Ĉiuj demandis lin tie pri la paĉjo, pri la panjo, pri la fratineteto — kaj kiam li estis al ili ĉion respondinta, oni plenstopis al li la poŝojn per amasoj da diversaĵoj kaj donis al li ankoraŭ grandan papersaketon plenplenan de dolĉaĵoj. Poste la gardisto akompanis lin ĝis la ĝardeno pordeto kaj senĉese ridis...

Sed Georĉjo ne havis ridhumoron. Jesueto — la paroloj de la panjo — la nubeto — iliaj teleretoj kaj tia arbo — giganto en la familio de l'gardisto — tio ĉio miksiĝadis en lia kapo. Ĉi tie nepre ne estis io en ordo...

Tiun tagon, ankoraŭ antaŭ ol li estis veninta hejmen, naskiĝis en lia koro fortega malkonfido, kiu skuis ĉion, kio ĝis nun estis certa kaj senduba...

Jes, ĉi tie nepre ne estis io en ordo.

Georĉjon doloris la maljusteco de homoj, doloris lin la maljusteco de Dio, doloris lin ĉio. Li kaŝis sin hejme en anguleto malantaŭ la lito, por ke li ĉion funde pripensu. El la alportitaj frandaĵoj li ne havis eĉ la plej malgrandan ĝojon. Kvankam li kontente rigardis, kiel la fratineteto ilin traesploras, kiel ŝi pro ili ĝojas kaj kiel ŝi prenas por manĝi, tamen li mem prenis al si eĉ ne peceton.

Li rigardis nubmiene, de tempo al tempo li vidigis eĉ ploremman vizaĝon, ĉar lia animdoloro transformiĝadis en fizikan. Ĝi komenciĝis, kiel se oni ekpremas la koron kaj poste stranga doloro penetradis la bruston. Vespere li ne povis jam silenti kaj diris pri ĝi al la panjo.

Ŝi ektimis, tuŝis lian frunton kaj metis lin tuj en la liteton kun zorgoplena vizaĝo. Ŝi persvadis lin eĉ al tio, ke li lasu meti al si sur la frunton vinagran kompreson. Li konsentis, sed tamen proklamis, ke tio helpus neniel — ke Jesueto devis esti pli justa.

La venintan tagon matene estis ankoraŭ pli malbone... La panjo alkondukis sinjoron kun okulvitroj, kiu skribis mal-

grandan folieton, por kiu la panjo post momento alportis boteleton da flava kaj dolĉa fluaĵo. La panjo eĉ alportis al li grandan oranĝon kaj donis ĝin al li tutan, kiam li promesis al ŝi, ke li kuŝos laŭorde kaj trankvile. Li formanĝis peceton, sed li ne havis apetiton. La doloro pligrandiĝadis. Li denove enseniĝis kaj vespere li diris al la panjo, ke li ne povas elporti la doloron — kaj ke li iros ĉion plendi kontraŭ Jesueto en la ĉielon.

La tutan nokton li kriis el la dormo. Ke Jesueto ne estas bona, ĉar li donacis al la knabineto grandan arbon kaj al li sole malgrandan telereton. Ke la gardisto prenis al li la arbeton kaj ke li krom tio ridis. Ke li ne volas plu oranĝojn nek sukeraĵojn...

Kaj efektive! La sekvintan tagon ĉirkaŭ la tagmezo foriris lia animeto... Georĉjo iris ordigi sian aferon kun Jesueto en la ĉielon...

La panjo ploris, kaj al la malgranda Manjo oni diris, ke Georĉjo mortis. — Sed nur se ŝi estus tion al ili kredinta! — Ŝi formanĝis la restintan duonon de l'oranĝo, formanĝis la sukeraĵojn — kaj estis fiera pri la frateto Georĉjo, kiu estis tiel kuraĝa, ke li sendis la animeton en la ĉielon, por ke ĝi tien iru al la bona Dio plendi kontraŭ Jesueto.

JAN NERUDA:

NIA HORLOĜO

Kiam al mi Joĉjo venis
kaj min arde ĉirkaŭprenis,
atestanto estis nur
la horloĝo sur la mur':
ĉiam gaje ĝi tiktakis,
kaj post ĉiu kiso nia
ankaŭ ŝmace ĝi ekklakis...

Tempo venis nun milita
kaj mi estas forlasita!
La horloĝo sur la mur'
nun tiktakas sen plezur':
ĝi rapidas tre malmulte,
kaj post ĉiu ĝemo mia
klakas ankaŭ ĝi singulte...

KONSENTO

Sub pino plendis viro al alia viro,
ke la virinoj estas malfidelaj.
Du korvoj sur la pin' konstatis kun ekmiro,
ke la kornikoj estas tre malhelaj.

El la ĉeĥa trad. M. Lukáš.

EL SCIENCO

Dr. STAN. KAMARYT:

PRI VITAMINOJ

Fiziologia kemio instruis longe, ke la nutraĵo de la homo devas konsisti, krom el akvo, el tri specoj de komplikaj organikaj ŝtofoj sakaridoj (karbonhidratoj), grasoj kaj proteinoj. Tiuj ĉi tri estis rigardataj laŭ rezultoj de la empiria esplorado ne sole absolute necesaj, sed ankaŭ tute sufiĉaj por bona nutrado. Oni eĉ mezuris la mezan kvanton de tiuj nutraj ŝtofoj bezonan por sufiĉa satmanĝo de laboranta homo. Vogt fiksas ĝin ĉirkaŭ la jaro 1890 je 120 g da proteinoj, 40 g da grasoj kaj 500 g da sakaridoj po tago. Tiuj ĉi nombroj estis pli poste atakataj precipe de diversaj abstinentistaj higienistoj, kiuj provis pruvi, ke jam 50 gramoj, eĉ malpli, da proteino po tage sufiĉas.

Laŭ tio ŝajnis, ke la sola nutra problemo reduktiĝas je fikso de bezona kvanto da nutraj ŝtofoj. Sed tiu vidmaniero evidente kontraŭstaris la popolan, ĝenerale respektatan kaj tre antikvan opinion pri preferindeco (tiel nomita sanigemeco) de kelkaj nutraĵoj, kiu ne povis estis klarigita per ilia kemia konsisto, precipe ne per enhavo de la nutraj ŝtofoj.

Nur en la plej lasta tempo oni ŝajnas esti veninta al komenco de solvo de tiu ĉi problemo. Abderhalden, Funk, Röhm an kaj aliaj sukcesis eksperimente trovi, ke en ĉiuj nutraĵoj enestas malgrandetaj kvantoj da ŝtofoj ĝis nun nekonataj, kies ĉeesto estas absolute necesa por sufiĉa, sanon konservanta nutro. Oni nomigis tiujn ŝtofojn vitaminoj kaj nutraminoj. Ili enestas versimile en ĉiuj nutraĵoj, sed ilia kvanto estas eksterordinare malgranda; tial oni tre malfacile ilin izolos. Relative plej facile tio sukcesas el grajnoŝeloj de diversaj grenoj. Ekz. Funk ricevas tre aktivan preparaton vitaminan el riza brano laŭ jena metodo: Polvigitan rizan branon oni ekstraktas per etilalkoholo, el ekstraktaĵo forigas la alkoholon en vakuo, aldonas al ĝi akvon, metas en dividfunelon, kie disiĝas la akvo kaj oleosimila fluidaĵo. Post forigo de tiu ĉi tavolo oni ricevas la vitaminon, kiu estis solvita en la akvo kaj ne precipitiĝas per arĝentnitrato kaj

bariohidrato. Post atenta forigo de ambaŭ tiuj precipitiloj oni ricevas puran solvaĵon de la vitamino, kiun oni eligas el la akvo per kristaligo. Ĉar la kvanto de ĉeestantaj vitaminoj estas ĉiam eksterordinare malgranda, ankaŭ la rezulto de tiaj procedoj estas laŭkvante negranda, sed ĝi pruvas senduban ekziston de tiaj ŝtofoj. Funk akiris ekz. per la skizita labormetodo el 50 kilogramoj da riza brano 0.4 gramojn da senkolora kristala ŝtofo. Sed ĝi estis ankoraŭ pluen disigebla per interrompata kristalado je du ŝtofoj, el kiuj Funk unun difinis esti nikotina acido kaj la duan, kies fiziologia efiko estis eksterordinare forta, kiel efektiva vitamino. Sed tiaj ŝtofoj estas konstateblaj ne ekskluzive en grenaj branoj, sed ankaŭ en ĝermantaj vegetaloj, butero, fiŝgraso, freŝa feĉo, freŝa suko citrona, freŝaj folioj sabelikaj kaj en multaj aliaj nutraĵoj kaj gustumaĵoj.

La solaj reakcioj laŭ kiuj vitaminoj kaj nutraminoj estas konstateblaj, estas iliaj efikoj fiziologiaj. Ilia manko en la nutraĵoj kaŭzas gravajn difektojn de la sanstato. Ekz. se kolomboj estas nutrataj per sufiĉa kvanto de senŝeligita rizo kaj akvo (do per nutraĵo kiu laŭ ĝisnuna scio devus sufiĉi) ili jam post 20 tagoj montras fortajn simptomojn de grava malsano similanta la homan „beri-beri“. Oni difinis tiun malsanon kiel polineŭritido. Ĝi finiĝas per morto. Sed se la kolomboj ankoraŭ en la 22. tago ricevis duonon de unu miligramo de la Funka preparaĵo, ricevita laŭ la supra izoliga maniero, la spasma malaperis dum duono ĝis du horoj kaj la animaloj estis tuj resanigitaj. Multaj similaj eksperimentoj je kolomboj, musoj kaj aliaj bestoj kun observoj de homaj sanstatoj kondukis al la konkludo, ke en nutraĵoj ekzistas diversaj tiaj fiziologie tre reakciemaj ŝtofoj, kiuj estas nepre bezonaj komponantoj de ĉiu nutro. Iliaj fiziologiaj efikoj estas tre specifaj. Ĝis nun oni konstatis almenaŭ 6 diversajn vitaminojn kaj nutraminojn kun diferencaj kvalitoj. Sed ŝajnas kredinde, ke ekzistas granda nombro da individuoj en tiu ĉi speco de ŝtofoj tiom gravaj por nutrado. El esploro de tiu ĉi kemia kaj fiziologia kampo oni povas atendi gravan instruon pri kvalitoj de taŭga homa nutrado.

PICHON:

LA MEMORO KAJ LA SENTO

Se mi studas, laboras la cerbo. La instruisto parolas, la lernanto aŭskultas, kaj lia spirito laboras por kompreni, kion la instruisto diras. La inteligenteco estas kapableco kompreni kaj pensi. Se ni studas, laboras ankaŭ alia kapableco: la memoro. Tiu ebligas al ni diri hodiaŭ tion, kion ni siatempe aŭdis, kion ni scias. La memoro kapabligas nin por rememorigi al ni tion, kion ni ellernis. Ni devas ekzerci kaj evoluigi la memoron.

Ĉu vi ne forgesis, kio estas doloro? Ĝi estas malagrabla percepto. Sed la doloro ne estas nur korpa percepto. Se iu kara mortis al ni, ni havas ankaŭ doloron, sed tiu ĉi ne alvenas de niaj sentorganoj, sed el nia interno, de la spirito, de la animo — kiel ni diras. Tio ĉi estas la sento. La sentoj — kiel ankaŭ la perceptoj — estas agrablaj aŭ malagrablaj. Se io plaĉas al ni, ni havas agrablan percepton; la ĉagreno estas malagrabla sento.

El nova lernolibro de
Dro G. Žďárský kaj K. Procházka



EL LEClONO DE FIZIKO

Pilo galvanana ŝanĝas kemian energion estigatan per tuŝigo de du diversaj substancoj (metaloj aŭ karbo) kun fluidaĵoj (likvaĵoj). Likvaĵo elektroveka estas elektrolito (tia estas preskaŭ ĉiam akva solvaĵo de sulfata acido). En la likvaĵo, izolite unu de la alia, troviĝas la ambaŭ substancoj, elektrodoj. La unun el ili, zinkon, oni opinias negativa kaj nomas katodo; la alian, pozitivan, anodo. Elstarantaj ekstremaj (finoj) de la elektrodoj estas poluso. Ili surhavas klemojn, kiuj fiksis la fluokondukilon (metalfadenon, draton) al la elektrodoj. Per kunigo de la klemoj estiĝas la fluo, kiu iras ne sole tra la kondukilo, sed ankaŭ tra la elektrolito, malkomponente ĝin. Hidrogeno, rezultanta el tio, malfaciligas la kontakton inter la elektrolito kaj anodo, per kio la pilo malfortiĝas — polariziĝas. Tion oni celas forigi metante ĉirkaŭ la anodo senpolarizigilon, substancon, kiu kaptas kaj ensorbas la hidrogenon. Ĉiu pilo, granda aŭ malgranda, kunmetita el la samaj substancoj, havas ĉiam la saman tension (streĉon) kleman. La pilo, kies elektrodoj estas grandaj kaj proksime unu al la alia havas malgrandan reziston internan kaj povas liveri fluan de sufiĉe granda intenseco Laŭ Dr. Rón. Hmd.

ĈU VI ESTAS ANKAŬ EN 1924 MEMBRO DE Ĉ. A. E. KAJ U. E. A. ?


NOVA EŬROPO

**LA VIRINOJ EN ĈEĤOSLOVAKA
RESPUBLIKO**

Verkis Františka Plamínková. El la ĉeĥa manuskripto tradukis Marie Cimrová.

RAJTO JE LABORO

De la jaro 1869 la virinoj instruis en publikaj elementaj knabinaj lernejoj, sed ili ne havis rajton instrui knabojn pli ol 8jarajn, kontraŭe la viroj havis la rajton instrui infanojn de ambaŭ seksoj. Antaŭ la milito la virinoj estis malofte nomitaj lernejestrinoj kaj tio okazis nur post malfacilaj bataloj kun la viraj konkurantoj.

Post starigo de la respubliko, tiuj ĉi bataloj estis malpli obstinaj kaj pli sukcesplenaj. En jaro 1922 la organizaĵo de instruistinoj sukcesis atingi, post pena laboro, ke estis akceptita leĝo, kiu enkondukas tiel nomatan „egalecon“ de instruistinoj kaj instruistoj en ĉiuj elementaj lernejoj (por ke la gelernantoj estu edukataj kiel en familio), sub komuna influo de viroj kaj de virinoj). La oficoj de direktoroj en lernejoj por knaboj estas rezervitaj al viroj kaj en knabinaj lernejoj al la virinoj; tiel oni atingis justecon por virinoj kaj pacon inter instruistoj kaj instruistinoj. La oficojn de inspektoroj en tiaj lernejoj okupas sole viroj, sed la virinoj komencas klopodi ankaŭ atingi tiajn oficojn.

La instruado en sublernejoj por infanoj (inter 3a—6a jaro) kaj la instruado pri virinaj manlaboroj estis ĉiam privilegio de virinoj; tamen eĉ tie, en sublernejoj, estis la viroj kiel direktoroj tre ofte, kaj kiel inspektoroj ĉiam. Post fondo de la respubliko estis jam kelkaj virinoj nomitaj kiel inspektorinoj de tiaj lernejoj. Krom tio la virinoj inspektis ankaŭ la edukejojn (vartejojn por infanoj ĝis ilia 3. jaro), azilojn por gelernantoj, fakajn lernejojn industriajn kaj familiajn.

Dum la lastaj 20 jaroj la oficon de instruistoj en mezaj lernejoj okupas, krom la viroj, ankaŭ la virinoj. Dum la milito helpe instruis profesorinoj eĉ en mezaj lernejoj por knaboj. Nun ili estas tien destinataj tute regule. Sed la oficoj de direktoroj en mezaj lernejoj por knabinoj estas okupataj preskaŭ ekskluzive de viroj (escepte de

2 virinoj) kaj ankaŭ inspektataj sole de viroj.

Dum la respublika regado estis nomitaj kelkaj asistantinoj de profesoroj en fakultato medicina, en alta teknika kaj supera komerca lernejoj kaj ankaŭ lektorinoj en universitato kaj bibliotekistinoj (Bibliotekista lernejo fondita en ĉeĥoslovaka ŝtato havas rimarkindan nombron de aŭskultantinoj).

En Ĉeĥoslovakio la kuracistinoj praktikas sian profesion de la jaro 1902. La sola publika funkcio, kiu sole escepte estis al ili konfidata, estis tiu de kuracistino por lernejoj. Nun kelkaj virinoj atingis oficojn de asistantinoj, de unuaj (primarioj) kaj duaj (sekundarioj) kuracistinoj (en frenezulejo); en la lasta tempo la virino estis nomita distrikta kuracistino en provinca urbo.

La publikaj oficoj, kiuj postulas ĝeneralan klerigon, estis malfermitaj por la virinoj jam antaŭ 50 jaroj; tiam la unuaj virinoj estis akceptitaj en poŝtan servon; pli malfrue la filinoj de fervojoficistoj estis akceptataj en servon de fervojoj. (Daŭr.)


NAJDEN GEROFF

La Bulgara Akademio de Sciencoj sole festis ankaŭ nelonge la centjaran datrevenon de la naskiĝo de la bulgara verkisto kaj granda patrioto Najden Geroff. Li estas unu el la plejado de la bulgaroj renovigistoj kiel Neofit Makariopolis, Petko K. Slavejkoff, T. Ikonomoff k. a. Tiuj ĉi apostoloj de la bulgara penso dediĉis sian vivon al la intelekta kaj morala altigo de la bulgara popolo en epoko, kiam ĝi estis vekiĝanta de longa koŝmaro de kelkjarcenta jago.

Naskita en la urbeto Koprivštica, en 1823, li studis tie, en Plovdiv kaj Odessa (Rusio), ĉie sciencavida, dotita per malofta inteligenteco kaj lingvosciencia talento. En Bulgarion li revenis en 1864 por tie semi la kulturon kaj esti certa gvidanto de la unuaj paŝoj, kiun la bulgara popolo faris en la libera vivo. Lia aktiveco komencis jam en Odessa per literaturaj etudoj, kolekto de poeziaĵoj, popolaj rakontoj kaj anekdotoj. Nomita profesoro en Plovdiv, li public's en 1849 lernolibron de fiziko, la unuan en sia speco, kaj en 1852 broŝuron titolitan „Kelkaj vortoj pri la bul-

gara lingvo". Interalie li skribis artikolojn pri la ŝanĝoj farendaj en la bulgara verbo. La krono de lia verko konsistas en la publikigo de Vortaro de la bulgara lingvo, kiu senmortigis la nomon de sia aŭtoro. Tiu ĉi ampleksa vortaro enhavas 70.000 vortojn kaj 10.000 anekdotojn devenantajn direkte de l'popola fonto kaj severe kontrolitajn. Substrekinda estas ankaŭ lia aktiveco en la politikaj kaj religiaj luktoj de l'bulgara popolo. Unuvorte li estis vera apostolo de la bulgara renesanco, por kiu li senlace laboris dum pli ol kvindek jaroj. Li mortis en 1900 en Plovdiv, lasinte sian nomon enskribita en la ora libro de la kultura historio de Bulgario, en momento de ĝia reviviĝo. Iv. H. Kr-off.

ĈEĤAJ OPEROJ EN HISPANIO. Du famaj ĉeĥaj operoj: „La vendita fianĉino“ de Bedřich Smetana kaj „Rusalka“ (Nimfo) de Ant. Dvořák estos prezentitaj en februaro 1924 en Barcelona kaj Madrid de aktoroj de la Nacia teatro en Bratislava kun solkantistoj Mařák, Huml kaj Novák. S-ro R. Slabý, docento de la universitato en Barcelona tradukis la tekstojn en hispanan kaj katalunan lingvojn. Reĝisoros Jar. Kvapil, direktos la komponisto Oskar Nedbal. La operoj estos prezentitaj ĉiu kvarfoje en ambaŭ urboj. Prezentadoj en aliaj urboj de okcidenta Eŭropo estas projektataj, precipe en Paris.

7940 ĈEĤAJ UNIVERSITATANOJ EN PRAHA. En la ĉeĥa universitato de Praha enskribiĝis por la vintra duonjaro 1923-24 7940 studentoj. En la jurista fakultato studas 3180, en la medicina 2174, en la naturscienca 1450, en la filozofia 1100 kaj en la teologia 36. Inter la studentoj estas 1320 virinoj. El ili en la naturscienca fakultato 520, en la medicina 390, en la filozofia 220 kaj en la jurista 190.

EL LA AREO DE ĈEĤOSLOV. RESPUBLIKO 140.374·19 km² (Bohemio 52.064·66, Moravio 22.315·56 Silezio 4.423·28, Slovakio 48.917·67, Subkarpata Rusio 12.635·02 km²) estas 42% plugteroj, 33% arbaroj, 10% herbejoj, 8·6% paŝtejoj, 1% ĝardenoj, 0·56% lagoj, lagetoj kaj marĉejoj, 0·12% vinejoj, 4·6% tero okupita aŭ okupota de konstruaĵoj.

ŜTATA BUDĜETO DE ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO en milionoj da kronoj

Por la jaro:	Enspezoj:	Elspezoj:	Deficito:
1919	3.709·75	8.615·35	4.905·6
1920	10.426·50	15.278·43	4.851·93
1921	17.298·92	18.026·46	727·54
1922	18.884·21	19.812·96	928·75
1923	18.812·39	19.371·04	558·67
1924	16.391·29	16.993·93	602·64

**UZU ESPERANTON PRAKTIKE
KAJ POR TIU CELO ALIĜU AL
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**
Membro 20 Kĉ, Membro-abonanto 45 Kĉ
(Informoj ĉe ni)

ESPERANTA MOVADO

LA XV.

La loka kongresa komitato eldonis lastan cirkuleron, en kiu ĝi informas pri la jeno:

Al ĉiuj aliĝintoj nepovintaj partopreni oni sendis aŭ sendos laŭdezire kongresajn insignon kaj libron kun programo kaj urboplano, atendante almenaŭ repagon de la sendkostoj (3 Kĉ). La nealiĝintoj povas ĉion ĉi ricevi por 10 Kĉ.

Kongresfotografiaĵoj estas riceveblaj ĉe firmo Bischof & Broel, Nürnberg, Bayreutherstr, la grandaj (el kongreseja ĝardeno kaj ĉe Dürer-monumento) po 1/8 dolaro (18 Kĉ), Schmausenbuck 1/4 dolaro, poŝtkarto 1/8 dol. —

La komitato finis bilancon kongresan, kiu montras ke la kongreso finiĝis per profito de ĉirkaŭ 30.000 Kĉ. Detalojn ni alportos venonte.

LA XVI. EN WIEN

Krom la informo pri la personoj de la Loka kongresa komisiono (v. Progreso, n-ro 2. p. 6.) la gazetoj ne ricevis pluajn sciigojn. Memkompreneble la preparaj laboroj jam komenciĝis kaj oni scivole atendas aŭdi pri ili.

Intertempe la Amuza Fako dissendis Demandaron pri kabaredaj vesperoj, aranĝotaj ĉiuvespere post la teatra prezentado, je la 22a horo. La prezentantoj estas petataj informi pri la punktoj de ilia programo kun diversaj detaloj. La intereshavantoj el Ĉeĥoslovaka Respubliko anoncu sin al Ĉeĥoslovaka Asocio Esp.

RADIOTELEFONA PAROLADO EN PRAHA

Ĵaŭde la 31. Januaro 1924, je la 19·50 horo [mezeŭropa tempo], la radiotelefona societo de Praha [„Radiojournal“] elsendos el sia stacio „Kbely apud Praha“ [ondo 1150 m, 1 kw] esperantan paroladon de S-ro Pitlík pri Praha, ĉsl. banlokoj, grotjo de Moravia Karsto, montaro Tatry. La parolado daŭros unu kvaronhoron. Ni danke akceptos informojn de samideanoj aŭskultintaj ĝin. Havigu al vi permeson aŭskulti en publika aŭ privata radiostacio de via loko.

ĈEĤOSLOVAKA MINISTERIO DE INSTRUADO KAJ ESPERANTO.

[Daŭrigo.]

Nedeviga kaj nepagita instruado de esperanto okazas en la knaba kaj knabina lernejoj en Třebíč, permesita per la dekreto de la 6. Oktobro 1923 (n-ro 118044/l. i. m.)

En la burĝa knaba lernejo en Kutná Hora estas permesita nedeviga instruado de esp. per la decido de la 20. Novembro 1923 (n-ro 103.951 de la Landa lerneja konsilantaro), se la loka lerneja konsilantaro aŭ la komunumo pagos la elspezojn.
Aug, Pitlík.

ĈEĤOSLOVAKIA TERITORIO DE U. E. A.

Januara cirkulero.

Al la delegitoj, vicdelegitoj kaj al ĉiuj membroj de U. E. A. mi sendas sinceran novjaran saluton!


Dum 1924 U. E. A. ĉiel penos akiri la membro-nombron 10.000, kio mem forigos la deficiton el la asocia bilanco. Nia teritorio povos grave helpi. Ni ja konas bone la vastecon de la esperantista movado en Ĉeĥoslovakio. Mi kalkulas

Kiu ne ricevis, skribu al mi.

Estis eldonita belaspekta broŝuro „Universala Esperanto Asocio en la juĝo de la esperantistoj“. Tre inda verketo de granda valoro propaganda inter esperantistoj. Ricevos ĉiu delegito.

Ofte oni demandas min pri insignoj de UEA: Estas ĉe mi granda provizo de pingloj, butonoj por membroj kaj por delegitoj. Prezo Kĉ 6.— por unu, Kĉ 54.— por 10 insignoj. Estas rekomendinde, ke ĉiu UEA-ano portu UEA-insignon.

Kelkaj administraj rimarkoj por la delegitoj: a) UEA. estas asocio de individuaj esperantistoj.



Orava, romantika kastelo en Slovakio

5000 personojn, kiuj fiere portas la verdan stelon kaj el ili certe almenaŭ 2000 estas jam tiom progresintaj, ke ili povus kompreni la gravecon kaj utilecon de U. E. A. ne nur por la movado, sed ankaŭ por ili mem. — Kial ili ĝis nun ne aliĝis? Eble nur pro tio, ke neniu venis por diri al ili: „Aliĝu!“ Du mil membrojn el nia teritorio povus havi U. E. A. kaj eĉ ne 1000 ĝi havas. — Delegitoj, jen via tasko por la jaro 1924!

Nia situacio teritoria estas sendube tute klara: Delegitoj kun siaj vicdelegitoj laboru en siaj regionoj tute libere laŭ la statuto, bultenoj kaj cirkuleroj. Mia tasko estas helpi, konsili, subteni, interveni, kompletigi kaj administri. La pasintan jaron ni uzis por preparoj — dum 1924 ni laboru!

Estis dissendita Oficiala Bulteno nro 10 kun speciala cirkulero por la ĉeĥoslovakiaj delegitoj.

Societoj, firmoj, kluboj, institucioj ktp. sekve povas aliĝi nur kiel Entreprenoj, neniam kiel M aŭ MA. b) La centra membro-kontrolo en Genève bazas parte sur membrolistoj, plenigitaj de la delegitoj. Memoru: sur unu membrolisto M kaj MA nur de unu sama loko.

c) La subskribita aliĝilo estas dokumento por via arkivo. Laŭ la aliĝiloj plenigu klare la membrolistojn kaj nur ilin sendu al mi.

d) Mi dankas al tiuj delegitoj, kiuj per depreno de nur 5% rabato finance subtenas mian funkcion.

Hradec Králové, la 1. januaro 1924.

O. Sklenčka,
ĉefdelegito de U. E. A.



LINGVA FAKO

VORTARO ESPERANTO-ĈEĤA

Kompletigo de Rud. Hromada,
(Daŭrigo.)

Vortoj, netroveblaj aŭ korektindaj en la Vortaro esp-ĉeĥa de Th. Čejka. Signo (n) signifas nova, ne rekomendata vorto.

Cekumo slepé střevo, -ito zánět jeho cepo kuchyňská cibule (rostlina)
ceramiko keramika
ceruzo běloba olovnatá (plumboblanko)
cezuro přerývka, pauza ve verši
cimentu cement
cirkonferenco kružnice (čára)
cirklo správně: kruh (plocha), často též kružnice
civito obec (v širším smyslu), -ano občan
Ĉantaĝo (n) vydírání
ĉifro ŝifra, -i, de-i; -aro kodex, klíč
Daktilo 1) datle 2) daktyl (stopa veršová) — UU
dalio jirina (bot.)
damasko damašek
damaskeni damaškovatí, -ita glavó, -aĝo
damcervo daněk
daŭbo dužina (sudu)
debetó debet, dluh na účtĕ; -i konton per
zatižiti účet, připsati účtu na vrub; -libro;,
-konto (ne má dáti) debetní účet (vykazující
dlužné saldo); -uloj [šešule]
dehiska (bot.) pukavý (u plodu, na př. lusk,
dekanti sceđiti, sliti
dekokto odvar
dekoliti dekoltovali, -o výstřih, dekoltáž
delfinio stracka (bot.)
dementi (n) vyvrátiti tvrzení, zprávu (nei)
demonstracio 1) projev 2) praktické před-
denominatoro jmenovatel (zlomku) [vedení
deprimi stisniti (mysl), -ita, -iteco
diafragma 1) (med.) bránice 2) fot. clonka 3)
přehrádka, diafragma (na př. el. článku)
diagramo nákres vysvětlující
dieso křížek (v notách) [(chem.)
difuzo 1) rozptýlení, lumó difuzita 2) prolinání
digitalo náprstník (bot.)
digna důstojný, -eco, -o
dikotiledona dvojděložná (rostlina) [taživost
dilato roztažnost (fiz.) -i; -eco, -iveco roz-
diligenco příležitost (pošt. vůz k osobní dopr.)
diluvio 1) potopa, též diluvo 2) starší odd.
dipsako štetka soukenická (bot.) [čtvrtohor
dipteroj hmyz dvoukřídlý
diskrediti pripraviti o důvěru
divano 1) divan, pohovka 2) turecká státní rada
divizoro dělitel (matem)
doko dok (loďař.)
dolĉa nejen sladký, nýbrž i líbezný, libý, lahodný
dragi bagrovatí, -ilo, -maŝino
draĝo odnož (rostl.)
drapiri dekorovatí, -isto čalouník
drato drát; pik-o ostnatý drát; -barilo drá-
tĕná překážka; sen-a telefonio
drivi plouti proudem, větrem (bez kormidlování)
droŝko drožka
drupo peckovité ovoce (třešně, švestky)
duno duna, písečný val (u moře)
durfi, darfi (n) smĕti [Daŭrigo.]

PŘEKLAD I. TEXTU

Došlo celkem 23 prací, z nichž 13, jež se kvalitou sobě téměř rovnají, bylo shledáno velmi dobrými. Bylo tudíž o slíbených 3 odměnách losováno a knihu Tra la mondo, internacia legolibro de P. Bennemann, II. díl, dostanou tyto vylosovaní: pi A. Grauerová (Přerov), p. J. Klůz (Nymburk) a sl. Reitmajerová (Praha).

Uveřejňujeme překlad I. textu a doporučujeme čtenářům, aby si jej srovnali se svým překladem.

La epoko de papero.¹⁾ Komence estis la ora epoko, kiel scias ĉiu leganto de Ovidio. Poste la ŝtona, bronza, fera ktp. Kiel oni nomus la epokon ĵus travivatan?²⁾ Mi opinias, ke ĝi estos nomita la papera epoko. Ĉar³⁾ nenio karakterizas nian epokon tiel kiel la konsumo⁴⁾ de papero. Antaŭ nelonge⁵⁾ la papero estis uzata sole por skribi kaj paki.⁶⁾ Hodiaŭ vi ne trovas fabrikan fakon, kiu ne uzas⁷⁾ paperon. El papero oni fabrikas vestojn, tolaĵon, meblaron, vazaron, oni konstruas el ĝi. Ĝi anstataŭas metalon kaj⁸⁾ ŝtonon, lanon, kotonon kaj⁹⁾ vitron. Jen la unua motivo, kial nian epokon oni nomos papera.⁷⁾ Sed ekzistas ankoraŭ aliaj. Ĉu nia tuta vivo ne estas grandaparte papera? Konsideru⁸⁾ nur, kiom el niaj scioj kaj konoj, sentoj kaj impresoj ni ĉerpis pere de papero? Forigu pense⁹⁾ el la moderna vivo paperon, libron, gazeton — kio restos al vi? Sed la papero, kiu al ni tiom donas, ankaŭ multon forprenas al¹⁰⁾ ni. Ĝi metis sin inter ni¹¹⁾ kaj la vivo¹²⁾ kiel nepre necesa¹²⁾ peranto, ĝi prenas al ni la senperan rilaton kun la real(ec)o, prezentante ĝin al ni ofte filtritan, malricigitan kaj senodorigitan. Je kiom pli vere, pli reale vivis niaj antaŭuloj, kiuj ne havis la paperajn impresojn, ĉerpante ĉion el la fonto de vivo. La novepoka homo kreis por si novan mondon el papero. Ĝi havas ja ankaŭ siajn belaĵojn, sed tamen ĝi estas ja nur papera. Papera estas nia epoko ankaŭ pro tio, ke ĝiajn plej belajn akiraĵojn ni havas sur papero. Ekz. (emple) la senarmigon, la mondacon, la socian egalecon. La papera epoko estas belega — sur papero. Al la skeptikuloj nekredantaj je ĝi kaj volantaj disputi, ke ĝi ne estas papera, mi tuj prezentos nerefuteblan pruvon! Cetere ili mem povas ĝin preni el sia monujo!

¹⁾ též: La papera epoko; nikoli: paperepoko

²⁾ lépe než: kiun ni ĵus travivas

³⁾ bezono = potřeba

⁴⁾ lépe než: por skribi kaj paki

⁵⁾ nikoli uzus

⁶⁾ nikoli eĉ, které znamená „i“ ve smyslu ba i dokonce i

⁷⁾ nebo kial nia epoko estos nomita

⁸⁾ (Pri)pensu

⁹⁾ lépe než: forpensu

¹⁰⁾ logičtější, ale ne nutné: de

¹¹⁾ též správně se 4. pádem

¹²⁾ lepší než: nemalhavebla

¹³⁾ aŭ = nebo, ĉar = nebo

¹⁴⁾ též: ankoraŭ antaŭ nelonge, nebo: ne pasis longa tempo de kiam

III. TEXT K PŘEKLADU.

Boj proti násilí a útisku — ať vystupuje v podobě sebe rozmanitější: v nadvládě národa nad národem ve vykořisťování stavu stavem či v nespravedlivé krivdě, páchané silnějším nad

slabŝim — je vĝdycky nejlepŝi ŝkola lidi a narodŭ. Vykupuje z malosti a malichernosti, sobectvi, oĉiŝtjuje z nevjĝtŝich neřesti, lenosti a zbabělosti, rozpoutává tisíc dřive dřimájících sil, učí cnostem, obětavosti, oddanosti a houřevnaté pracovitosti, vychovává k odvaze a stateĉnosti, posvěcuje k hrdinství a velikosti. Povahy, jeř v tvrdou ocel skaliła takováto sluřba věĉné spravedlnosti jsou z nejskvělejŝich statků narodŭ: jsou nevyĉerpateľnou radostí a potĉhou všem, kterým se dostalo ŝtĝsti mezi nimi řiti, jsou nejbezpeĉnějšim kompasem a znakem správnosti a cesty, jimiř kráĉejí. jsou nejnecennĝjšim odkazem a posilou potomstvu.

LINGVAJ RESPONDOJ

Vřem. Redakce jest ochotna odpovĝdati na jazykové dotazy předplatitelŭ Progresu. Tázete-li se na ĉeský význam slova, uveďte celou větu, v niř se slovo nalęzá a udejte, kde jste ji nalęzli (str. knihy, ĉíslo ĉasopisu, řádek).

B. L. en N. boaco sob (zool.) — oplývati něĉim abundi per io.

Vitaminoj. precipiti (chem.) sraziti -iĝi, -ilo, — Gustumaĝo pochutina. — Brano otruby. — Arĝentnitrato dusiĉnan stříbrnatý.

J. S. en M. H. Indiki oznaĉiti, udati, — revelacio zjeveni boři — graco milost (boři) — strakapŭd lano.

BIBLIOGRAFIO

Libroj

AKBAR. De P. A. S. van Limburg Brouwer. Orienta romano. Trad. J. C. kaj J. R. G. Isbrŭcker kaj J. Ziermans. (Rekomendita de E. L. A.) 1923. Pĝ 256. Eldono de la tradukintoj. S'Gravenhage, v. Beverningkstr. 10 Prezo 20 Kĉ.

Interesa rakonto pri la hinda imperiestro Akbar kaj la malnova hinda historio. La leganto baldaŭ eksentos simpatian al Akbar, kiu sciis sendiference rilati kun personoj de kiu ajn nacio kaj religio. En plaĉa maniero estas priskribitaj multaj intrigoj kontraŭ Akbar kaj la feliĉa fino de ĉio. Laŭ la antaŭparolo enestas multe da historia vero, kiu tamen nenie tedas. La traduko estas klara, bone komprenebla. Tre valorigas la libron la aldonitaj lingvaj notoj de la lertaj tradukintoj. Oni trovas tie klarigon de la neologismoj kaj de la fremdaj vortoj uzitaj. Ni bedaŭris, vidinte tamen en la diketa volumo kelkajn lingvajn erarojn. Riproĉindaj estas frazoj, kiel „zorgu, ke vi ne bezonos“ anst. „... bezonu“ (pĝ 15), „mi volas, ke mi povus“ anst. „povu“ (30, same 66), kaj simile sur 7 pluaj lokoj. Preseraroj estas eble „timi tio“ (180) anst. „tion“. Ni ne skribus „li serĉis sian serviston por seli lian ĉevalon“, sed „sian ĉevalon“ (240). Ne klarigitaj en la lingvaj notoj estas „ĉef-mansabodoro“ (53, 123 k. a.) kaj „omra“ (123). Ĉe „Gijs“ (141) estus utile aldoni prononcon (ĉu „gijs“ au „hajs“). Sed tio ĉi neniel ŝanĝas nian juĝon, ke la libro estos ŝatata legaĝo.

FABELOJ de Andersen. Plena kolekto. I. parto. Trad. D-ro L. L. Zamenhof. Eldonis Centra Libro Esperantista en Paris 1923. P. 152, 15 x 21.

Enhavas 18 fabelojn, tradukitajn de la Majstro mem. Jam pro tio la kolekto certe estos legata de ĉiu esperantisto, tiom pli, ke kelkaj el la tradukoj aperas unuafoje en tiu ĉi libro. Prezo 8 fr. (12 Kĉ afr.)

LA ESPERANTISTO EN GERMANIO. Gvidlibro tra la germana lingvo de Hans Koch (München). Eldonis Oscar Ziegler, Deisenhofen b. München. P. 184 16 x 12. cm Lerte verkita esperanta lernolibro, kiun ni varme rekomendas al ĉiu nia leganto, kiu volas akiri sufiĉan scion de la germana lingvo. Prezo Kĉ 20.

BUKEDETO. Sep divesnaciaj rakontoj, trad. de Margarethe I. Krestanoff. Eldonis la antaŭa. 48 p. 12 x 16. Laŭ enhavo interesa kaj laŭ lingvo bonega legilo. Se vi serĉas legaĝon por via kurso, uzu ĝin. Prezo 4 Kĉ.

KRONIKO EL ĈEĤOSLOVAKIO

Oficiala raporto de Ĉsl. Asocio Esp.
laŭ senditaj informoj.

Oficiala instruado de e. En Bratislava dum la lernejjaro 1923/24 en ŝtata reallernejo (33 lern. de la 4a klaso) kaj en Knaba civitana lernejo (16 lern.) Instruas po 2 horoj semajne prof. Stan. Kamaryt.

Novaj kursoj. En Ústí n. Orł. kurson por 23 p. gvidas instruisto Barkman. — Kurson por 10 progresintoj gvidas S-ro Vaŝiĉek. — En Hranice S-ro Bryndaĉ instruas 32 p. — En Přerov prof. Pittner instruas 60 p. en du kursoj. Kurson por progresintoj gvidas S-ro Malík.

Nova klubo fondiĝis en Prostějov, prez. F-ino Marie Havránková, faka instruistino, Pod Kosiřem 31.

Ekspozicio. Esperantistoj en Přibyslav (gv. S-ro Jan Vencálek, Del. de UEA) aranĝis la 13 Januaro bone vizititan ekspozicion esp. kaj ripe-tis ĝin la 20. Jan. en Nĝm. Brod.

Ekzamenon pri esp. antaŭ la ŝtata komisiono por elementaj kaj burĝaj lernejoj (komisario Dir. Eiselt, prez. de ĈAE) en Praha faris la 6 Novembro 1923 F-ino Rŭžena Křikavová, faka instruistino en Nová Paka, kun bonega sukceso.

Ekzamenon pri scio de esp. antaŭ la Ekzamena komisiono de Ĉsl. Asocio Esp. en Praha faris la 28. Septembro jenaj ges-oj: Barešová, Janda, Paľeĉek, Slaba, Šilhavá el Praha kaj S-ro Toth el Ĉeský Brod. Ekzamenis: Bouška, Eiselt, Hromada, Šupichová.

Regionaj kunvenaj. Laŭ informo de S-ro Babinec, prez. de E. K. Slezská Ostrava, la regiona kunveno ne okazis en Sl. Ostrava, nek en Vítkovice, sed estis prokrastita. Ĝia okazigo estos ĝustatempe anoncita.

La kunveno de orientbohemiaj esperantistoj okazas en Dvŭr Králové la 2—3 februaro 1924.

Gazeta Servo. Multaj informoj pri progresoj de esp. aperis en ĉiutagaj kaj semajnaj gazetoj ĉeĥaj. — Revuo „Ĉeskoslovenská pošta, telegraf a telefon“ publikigis en la 10 n-ro (12 Dec.) longan artikolon de Dro A. Burda: Esp. en la internacia telegrafio, favoran por esp.

En gazeto „Studentská turistika“ S-ro Pitlík gvidas esp. rubrikon. — En turista kalendaro la sama aperigis artikolon pri esp.

Honoran diplomon al E. Klubo en Brno sendis Ekspozicia Foiro en Brno kiel dankon por la modela aranĝo de faka esp. ekspozicio, dum Foiraj Tagoj (5—20 Aŭg.) Helpis precipe membroj Barviř, Fridrich, Stourač, Válka, Vondroušek.

LOKAJ RAPORTOJ

Praha. Esperantista Klubo kunvenas ĉiunvende en speciala ĉambro de kafejo Edison (Přikopy, 1). La 16./11. S-ro Pitlík raportis pri la kunveno en Česká Lípa kaj pri Dro Giesswein. La 23./11. S-ro Lukáš recitis el siaj tradukoj de ĉeĥaj poemoj. La 7./12. F-ino Vlčková recitis poemon La Perlo de J. Zeyer, trad. de V. Čánský. La 28./12. S-ro Dejmek parolis esp. pri Afriko.

Brno. Nove aranĝataj kursoj de S-ro Šembera en decembro, 26 p. Esp. klubo daŭrigas konversaciajn kursojn de S-roj Barviř kaj Šembera, 24 p. S-ro Kroužil instruas en industria lernejo 25 lernantojn; en Teozofia societo 30 p. En komerca lernejo de Kozák instruas direktoro Bednář sukcese 45 lernantojn. En popolklerigaj kursoj germanaj S-ro Podloučka gvidas kurson por komencantoj kaj kurson por progresantoj. (30 partopren.) En popolklerigaj kursoj ĉeĥaj parolis jam kvarfoje publike S-ro Šembera, kiu nun aranĝos publikan kurson ankaŭ en lernejo Křenová.

Nove preparataj kursoj: por Zemský cizinecký svaz kaj por policanoj.

Přerov. La 21./10. La klubo aranĝis Akademion, kiu kronis la belan ekspozicion unusemajnan. La himnon kaj la kanton Nur antaŭen (teksto de S-ro Malík, melodio de ario el opero M. Zrinski) kantis la horo „Svornost“. Pri esp. parolis prof. Fridrich el Brno. Ankaŭ ĉiuj aliaj partoj de la programo multe plaĉis. La programon finis „Viva bildo“ laŭ projekto de S-ro Malík, prez. Fotojn de tiu interesa bildo vendas la klubo (Adr. S-ino A. Grauerová, Tratidla 44, Přerov) po 1.50 Kč.

Hradec Králové. La 5./12. la E. Klubo aranĝis Donacan vesperon, je la 19a horo por infanoj, je la 23a por membroj. — Alia amika vespero okazis la 3f./12.

ORGANIZO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO.

Dum Landa kongreso de Ĉeĥoslovaka Popola Politika Partio okazinta je pentekosta lundo la 21. majo 1923 la katolikaj esperantistoj aranĝis konferencon, dum kiu estis pritraktita la temo, ĉu la ĉeĥoslovakaj katolikoj ankaŭ okupu sin pri esperanta demando. Post amika diskuto oni decidis elekti okmembran komitaton por labori al unuigo de katolikaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio. Dum la pliaj kunvenoj oni definitive elektis la komitaton kaj laŭ deziro de la membroj ĝi aliĝis al Katolika konsilantaro, kiu ĝin akceptis kiel sekcion de katolikaj esperantistoj. Ĉiu aliĝinta membro de la sekcio estas samtempe membro de la Katolika konsilantaro, kaj de Ĉeĥoslovaka Esperanta Asocio (ĈAE). La sekcio estis tiu ĉi jare oficiale reprezentita en la VIIIa Esperanta Kongreso de katolikoj en Nürnberg kaj en la IIIa Esperanta Kongreso de katolikoj en Konstanz.

La 29 septembro estis aranĝita en Praha propaganda poresperanta kunveno, dum kiu parolis f-no L. Dandová kaj s-ro Fr. Zelenka. La 25 oktobro estis malfermita 3monata esperanta kurso por komencantoj, kiun gvidas f-no L. Plzenská. Esperanta sekcio de Katolika konsilantaro en Ĉeĥoslovaka respubliko, Praha II. Spálená 80., laboras por disvastigo de esperanto inter katolikoj kaj kunigas ĉiujn esperantistojn katolike pensantajn. Ĝi amike laboras kun la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista por la sukceso kaj ĉiufanka utiligo de esperanto. En la sekcio funkcias prezidanto s-ro Fr. Zelenka, revidento de Landa politika administracio, vicprezidanto s-ro Fr. Pavelka, inspektoro de Ĉeĥoslovaka fervoja direkcio kaj sekretario s-ro Fr. Buhr, bankoficisto. Fr. Buhr.

LABORISTA LIGO ESPERANTISTA

Sidejo: Pizeň-Karlov, Na pomezi 15 (Sokr. Büchl V.) (Oficiala raporto)

Asocio aranĝas preparan kurson por ŝtataj ekzamenoj de esperanto, kiun gvidas S-o instruisto Hahn, I. parto de tiu ĉi kurso finis, II. parto komencis januare.

Novaj grupoj: Chrochovice (norda Bohemujo), Podmokly n. L., Skvrňany apud Pizeň.

Jenaj grupoj aranĝas la kursojn por komencantoj: Doubravka apud Pizeň, 20 lernantoj, gvidas s. Hylák; Letná apud Pizeň, 26 lernantoj, gvidas s. Kódl; Karlov, 20 lernantoj, gvidas, s. Büchl; Pizeň I. 22 lernantoj, gvidas, s. Hovorka; Podmokly, 25 lernantoj, gvidas s. Šába; Chrochovice, 20 lernantoj, gvidas s. Šába.

Grupo Pizeň I. aranĝis 15an de decembro en „Laborista domo“ „Peklo“ solenan vespereton, je honoro de naskiĝo de dr. Zamenhof.

Grupo Pizeň Letná aranĝis 9an de decembro solenan vespereton je honoro de naskiĝo de dr. Zamenhof.

Grupo Karlov aranĝis 25an de Decembro paroladon de S-o Pech akompanatan per 200 lum-bildoj je temo „Dalmatio, lando de la suno kaj la maro“.

Publikaj paroladoj pri „Lando de noktomeza suno“ kaj pri esperanto estis aranĝitaj en jenaj lokoj: Skvrňany en granda halo de „Laborista domo“; Letná apud Pizeň, en „Laborista domo“; Stodo apud Domažlice, paroladis s. Pech. L. L. E. instigas siajn grupojn, ke ili aranĝu la kursojn ankaŭ por progresintoj, ĉiam, kiam tion postulas la neceso. Ĝi rekomendas al grupoj, ke ili faru la preparojn por ĝeneralaj kunvenoj kaj informu L. L. E. pri la dato por ke ĝi povu delegi parolanton. Ĉiu grupo elektu en sia centro bonan samideanon kiel delegiton al ĝenerala kunveno de L. L. E. kiu povus esti elektita, eventuale, kiel kunlaboranta komitatano.

Laboristoj esperantistaj aliĝu al L. L. E.! Nur multenombra Asocio havas signifon!

La grupoj kiuj aranĝas amuzvespereton aŭ paroladon sciigu tion al centra komitato, por ke ĝi povu trastudi la programon. Ĉiujn korepondaĵojn oni adresu al: Büchl V., Pizeň-Karlov, Na pomezi 15.

OFICIALA INFORMILO

de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista

Propagaĉni prednaŝka pred zahájením kursu. P. O. zhotovil text vhodně přednášky a zapůjčil je na požádání členům Svazu.

Nové kluby Svazové. Esp. Grupo Frateco v Holešově, předseda prof. Růžička, jednatel V. Krajča, Holešov, Novosady 12. Klub vydal nálepky esperantské. — Esp. klub v Prostějově přihlásil 22 členů. Předs. sl. Marie Havránková, učitelka Prostějov, Pod Kosířem 31. — Esp. klub v Ústí nad Orlicí přihlásil 38 členů.

Na propagaĉni daŝ v lednu zaslal Klub v Nymburce Kč 100—. Díky.

Propagaĉni pomůcky. Upozorňujeme kluby i jednotlivce, že Svaz vydal a má na skladě:

Svaz národů o esperantu. 48 str. Úplná zpráva gen. sekretariátu Svazu národů o stavu hnutí esp., sestavená na základě úředních dokladů. Cena 5 Kč, pro členy Svazu 3 Kč, 10 výt. za 20 Kč.

Mezinárodní jazyk a autority 8 str. výroků vynikajících autorit o m. j. 10 výt. za 3 Kč, 100 výt. za 20 Kč.

Manifest učitelstvu o esp.-u. 2 str. 20 výt. 1 Kč 100 výt. za 5 Kč.

O zkouškách z esp. 8 str. Řád a požadavky zkoušek svazových i státních. Za 2 Kč.

Zpráva Obchodní komory v Paříži o esp. 2 str. 10 výt. za 2 Kč, 100 výt. za 15 Kč.

Rozšiřujte ve svém okolí tento propagaĉni materiál, který vám Svaz nabízí za levnou cenu a umožníte tak vydávání dalších propagaĉních pomůcek.

Valná hromada Svazu bude se konat v neděli 23. března. V sobotu 22. klub pražský uspořádá přátelský večer, na Veletrhu bude esp. výstava a přednášky. Podrobnosti přístě.

Měsíční zprávy klubů. Klubům Svazovým zdůrazňuje se důležitost těchto výkazů. Žádáme, aby nám byly zaslány do 5. každého měsíce, dle vzoru našeho dotazníku.

Výborová schůze Svazu konala se 19. ledna. Kromě jiných učiněna následující rozhodnutí:

Reprezentanto de Ĉ. A. E. en la konstanta Reprezentantaro estis elektita Dro Kamaryt.

II. kongreso de ĉsl. esp. en Liberec 8.-9. Junio. La komitato de ĈAE aprobis la kongresan komitaton, konsentas pri la kotizo 15 Kč, pruntas 500 Kč kaj garantias 1000 Kč.

IDR. En la nove konstituigintan I. D. R. estis delegitaj: Ĝinz (propagando), Pitlík (rilatoj kun ministerioj), Sklenčka (statistiko).

Jos. Eiselt, preds. R. u. D. Hromada, gen. sekr.

ADMINISTRACIA KOMUNIKO

Premioj al personoj abonintaj ĝis la 15. Dec. aŭ pagintaj 21 Kč ĝis la 5. Jan. estos dissendataj fine de februaro, laŭ elekto de l'paginto. Tamen, ĉar la Centra Librejo Paris respondis, ke la Fundamenton ĝi povas liveri nur en junio, tiuj kiuj ne volas atendi, povas elekti unu el la du aliaj libroj.

Dua n-ro. Certa parto de la 2-a n-ro estis presita sur malpli bona papero. La presejo ĝustigis sian eraron, sendinte alian ekzempleron. Kiu ne ricevis ĝin, postulu ĝin de ni.

PROPAGAĈNĪ ODBOR

PROPAGAĈNĪ MATERIĀL VĪBORNĪ naleznete v Esperantském Zpravodaji. Ročník I. (neúplný) a II. (celý) za 6 Kč, ročník III. celý po 5 Kč. Žádejte u adm. Progresu.

ESPERANTO V JAPONSKU PO ZEMĚTŘESENĪ. Říše japonská je jedna ze zemí v dálném východě, kde význam esperanta byl brzy pocípen. Práci několika vynikajících Japonců se podařilo, že bylo již před lety na mnoha místech v zemi zahájeno vyučování esperantu, takže se tam jazyk rychle rozšířil a brzy byl prakticky užíván. Zemský svaz japonských esperantistů s vlastním nakladatelstvím a knihkupectvím jest jeden z předních ve světové organizaci. S potěšením proto byla čtena zpráva, že úřadovny svazu v Tokiu zůstaly zemětřesením neporušeny. Zničeny jsou jen budovy esperantského nakladatelství Nippon Esperantosya, japonští esperantisté však oznamují, že za nedlouho budou znova zřízeny.

ESPERANTO V NĚMECKĚM ŠKOLSTVĪ. V Německu, kde v několika státech se vyučuje esperantu na školách, jest pocífován silný nedostatek učitelů tohoto jazyka. Pruské ministerstvo vyučování vydalo proto výnos, jímž se nařizuje soupis učitelů, způsobilých vyučovati esperantu. Podle výsledku soupisu hodlá pak ministerstvo zahájití potřebné další kroky.

VYUČOVÁNĪ ESPERANTU V RUMUNSKÝCH ŠKOLÁCH. Ve všech částech Rumunska pracuje se horlivě k zavedení esperanta do veřejných škol, namnoze za podpory úřadů. V Bukurešti byly zahájeny kursy ve státních liceiích Spiru Haret a Matei Besarab, stejně v učitelském ústavě v Gradište u Bukureště. Zájem o esperanto je v celé zemi tak značný, že i soukromé jazykové školy najímají učitele tohoto jazyka, tak škola společnosti Ĝib v Bukurešti a Berlitzova škola v Černovicích.

LOTYŠSKĪ PĚVECKĪ SBOR ESPERANTSKĪ, již druhý v této zemi, ustavil se za vedení vynikajícího dirigenta H. Prusise v Rize. Vystoupil již několikrát s vybraným esperantským repertoirem na veřejnost a sklídl vždy velký úspěch. Sbor hodlá odebrati se též za hranice a uspořádá koncert snad při příštím světovém kongresu esperantském ve Vídni.

LABORISTOJ ATENTU!

Mi serĉas interrilaton kun ĉeĥaj samideanoj, seriozaj poresperantaj propagandistoj en la rondo de la ĉeĥa laboristaro. Nur vere agemaj kamaradoj komuniku siajn adresojn al kamarado Siegfried Feith, Wien VI. Gumpendorferstr. No 91; 2 Stiege, Tür 14, Mezzanin.

ESPERANTA GRAMATIKO SUR POŝTKARTO

ricevebla ĉe R. Fridrich, Královo Pole, Purkyňova 79. **Nur kontante!**
10—3 Kč, 50—12 Kč, 100—20 Kč, 500—80 Kč,
1000—110 Kč. Petu specimenon kaj ĉekon;
Lernejoj rabaton!

